

BULTENO de REU

OFICIALA INFORMILO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO
№ 105, Julio 2019



Komenciĝis julio. La monato plej varma en nia duonsfero, monato, kiam abunde maturiĝas beroj kaj fungoj, kaj monato, plej saturita de esperantistaj renkontiĝoj – BET, UK ktp., ktp... En nia lando la plej grava evento estas TEMoj en Tihvino, en kadroj de kiu okazos la Konferenco de nia asocio. Al preparo de tiuj eventoj estas ĉefe dediĉita tiu ĉi numero. Do, ni esperu, ke por rusiaj esperantistoj la nuna julio estos ĉiuflanke fruktodona, kaj REU post ĝi havos novan elanon por sia ekzisto!

Estraro de REU

Jubileo

La 7-an de Julio 2019

fama rusia esperantisto – instruisto, movada organizanto, poeto, bardo, verkisto, tradukisto, historiisto, publicisto –

Mikaelo Bronŝtejn (Bruna Ŝtono)

fariĝas 70-jaraĝa.

Estraro de REU kaj la tuta nialanda kaj tutmonda esperantistaro sincere gratulas la elstaran kaj senlacan batalanton por la verda afero kaj internacilingva kulturo okaze de la jubileo kaj deziras al li pliajn sukcesojn sur ĉiuj kampoj de lia vivo kaj agado!



La kultura suplemento “Cerbe kaj kore”, kiun vi ricevas kune kun tiu ĉi numero de la Bulteno de REU, estas plene dediĉita al la glora jubileo.



Provizora programo de TEM-oj
Tihvinaj Esperanto-Metiejoj –
2019
Programo

Ĉiutagaĵoj:

7.30 – Matena gimnastiko
8.00 – 9.00 – Matenmanĝo
10.00 – 12.00 – Kursoj diversnivelaj
13.00 – 14.00 – Tagmanĝo
14.00 – 15.00 – Libera tempo, Libroservo
18.00 – 19.00 – Vespermanĝo

15.07 - Lundo

8.00 – Alveno de la partoprenantoj, registrado, matenmanĝo
10.00 – Malfermo de la ekspozicioj
11.30 – “Decembrista ribelo” – prelego de Anna Striganova
14.00 - Malfermo de TEM-oj
15.00 – Pentroarta metiejo de Nina Korĵenevskaja
16.00 – Literatura metiejo de Valentin Melnikov
17.00 - 18.00 - Vespermanĝo
18.00 – Busveturo en la urbon
19.00 – Koncerto de Andrej Korobejnikov en la Kulturpalaco
22.00 – Barda kafejo. Kantas Mikaelo Povorin
23.00 – Ludo-metiejo de Evelina Sokolova

16.07 - mardo

9.30 – Movada metiejo – “SAT-kongreso en Serbio” – prelego de Emmeran Eder
10.30 – Lingva metiejo de Aleksandr Melnikov
12.00 – Movada metiejo de Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova
14.30 – Busveturo en la urbon
15.30 – Koncerto de Andrej Korobejnikov en la muzeo de Rimskij-Korsakov
20.00 – Vivo-metiejo de Mikaelo Bronŝtejn
21.00 – Barda kafejo: Kantas Elena Birjukova kaj Olga Tihomirova
22.00 – Ludo-metiejo de Vladimir Minin

17.07 - merkredo

9.30 – Konferenco de REU
9.30 – Por nepartoprenantoj – forveturo en la urbon, ekskurso
14.00 – DARTS- konkuro de Aleksandr Belov
15.00 – Konferenco de REU
15.00 – Fabela metiejo de Anna Striganova
16.00 – Vivo-metiejo de Nina Korĵenevskaja
17.00 – Forveturo en la urbon
17.30 – Tihvina vespero en la arternejo Rimskij-Korsakov
22.00 – Barda kafejo: Kantas Mikaelo Bronŝtejn kaj Sergeo Straŝnenko
23.00 – Ludo-metiejo de Mikaelo Povorin

18.07 - ĵaŭdo

Ekskursita tago, programo por nepartoprenantoj – aparte
19.30 – Prelego “Origino de la vivo” de Nikolao Gudskov
22.00 – Barda kafejo: Kantas Sofia Makarova

19.07 - vendredo

9.30 – Prelego de Gennadij Basov “Linukso kaj Esperanto”
10.30 – Lingva metiejo de Aleksandr Melnikov
12.00 – Interpretista konkurso de Vladimir Minin
15.00 - Sporta metiejo de Aleksandr Belov
15.00 – Pentroarta metiejo de Nina Korĵenevskaja
16.00 – Literatura metiejo de Valentin Melnikov
17.00 – Vivo-metiejo de Gennadij Ŝilo
19.30 – Kanto-metiejo de Mikaelo Povorin
21.00 – Barda kafejo: Kantas Ekvinokso
22.30 – Ludo-metiejo de Evelina Sokolova

20.07 - sabato

9.30 – Tradukista metiejo de Mikaelo Bronŝtejn
10.30 – Lingva metiejo de Aleksandr Melnikov
12.00 – Lingva metiejo de Aleksandr Basov
15.00 – Vivo-metiejo de Aleksandr Belov
17.00 – Kantas Nina Djomuškina
21.00 – Adiaŭa vespero

21.07, dimanĉo

10.00 – Amika rondo

Proponata tagordo de la 30-a Konferenco de REU

La 30-a Raport-reelekta Konferenco de REU (17–18.07.2019)



La unua kunveno (17.07.2019)

09:00–09:30	Registrado de la partoprenantoj, ricevo de la mandatoj.
09:30–09:45	Saluta vorto de la Prezidanto. Malfermo de la Konferenco. Elekto de la organoj de la Konferenco: - kunvengvidanto(j); - protokolanto(j); - kalkulkomisiono el 3 personoj. Kalkulo de la kvanto de delegitoj. Akcepto de la tagordo de la Konferenco.
09:45–10:45	Raporto(j) de la Estraro pri la agado post la antaŭa Konferenco: - raporto de la Prezidanto (S. Smetanina), de la vicprezidanto (N. Gudskov); - raporto pri la plenumo de la decidoj de la 29-a Konferenco; - raportoj de estraranoj pri specifaj temoj: eldonagado (N. Gudskov), regiona agado (I. Gončarova), instru-agado (voĉlego de la raporto de V. Opletajev), membraro, retaj servoj (A. Mitin), retejo (A. Lebedev); - financaj raportoj: kaso, Kondratjev-fonduso (A. Lebedev), cetero (S. Smetanina); - voĉlego de la raporto pri REJM (sendita de K. Noviĉenko); - raporto pri Kondratjev-vortaro (A. Osokin), se estos. Raporto de la komisiitoj: - V. Aroloviĉ pri dokumentado; - V. Seguru pri la agado sur la kampo de eternigo de memoro pri Ludoviko Zamenhof kaj oficialigo de Esperanto-objektoj en Rusio; - V. Masjagin pri kontaktoj kun Komisiono pri Azia-Oceania EsperantoMovado.
10:45–11:15	Raporto de la Kontrol-revizia komisiono
11:15–11:30	Debatoj pri la raportoj. Pritakso de la laboro de la Estraro (voĉdonado). Pritakso de la laboro de KRK (voĉdonado).
11:30–12:00	Konfirmo / amendo / malkonfirmo de la aktoj, akceptitaj de la Estraro: - Regularo pri la fonduso de REU «Subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev» - Regularo pri la «Eminente rusia instruisto de Esperanto (de la lernojaro...)» - Regularo pri la Komisiono pri eksteraj rilatoj de REU (plus decido pri daŭrigo aŭ ĉesigo de funkciado de tiu Komisiono)
12:00–13:00	Raportoj de kolektivoj

Paŭzo por tagmanĝo

La dua kunveno (17.07.2019)

14:30	Kontrolo de la kvorumo
14:30–15:00	Proponoj kaj sinproponoj por la posteno de la Prezidanto. Eventuala amendo de la regulo pri la maksimuma kvanto de sinsekvaj prezidantecoj de unu persono (art. 6.4 de la Ĝenerala regularo).
15:00–15:15	Elekto de la Prezidanto.
15:15–15:30	Debatoj pri bezono de Vicprezidanto(j), eventuala elekto de tiu(j).
15:30–16:00	Elekto de la Estraro.
16:00–16:30	Elekto de la Kontrol-revizia komisiono.

16:30–16:45 Debatoj pri bezono de aliaj komisionoj kaj komisiitoj; eventuala elekto de tiuj.

(Se la elektoj estos rapidaj kaj ne okupos la tutan planitan tempon, eblos pli frue komenci pridiskuti demandojn, listigitajn por la tria kunveno)

La tria kunveno (18.07.2019)

19:30	Kontrolo de la kvorumo
19:30– 19:45	Raporto pri la unua Kunveno de la novelektita Estraro kaj ties decidoj.
19:45– 21:00	Prezento kaj pridiskuto de projektoj, proponoj kaj novaj ideoj por REU en la nova agadperiodo: - pripensoj de estontaj aranĝoj, decido pri sekvajara RET; AMoRU; - retaj kaj informaj servoj de REU: Oficiala paĝaro, VK-grupo, dissendolistoj, «Bulteno de REU», «Cerbe kaj kore»; - optimumigo de membrokategorioj; - ideoj de Aleksandr Mitin; - librotenado en REU; - financa planado kaj budĝetado en REU; - ĉu rusia ILEI-sekcio aŭ instruista laborgrupo / laborrondo / komisiono ĉe REU?
21:00– 21:30	Diversaĵoj: - nomo de BdR; - ...
21:30	Fermo de la Konferenco

Sendu viajn proponojn por la Tagordo al la komuna adreso de la organiza komitato — konferenco@reu.ru.

Krome, vi povas skribi la proponojn en la VK-grupo de REU en la koncerna «pridiskuto»: https://vk.com/topic-163508701_39509590

Rezultoj de la laboro, raportoj Klubo de instruistoj

Rezultoj de la Esperanta lernoĵaro 2018 – 2019 (Instruperiodo: julio 2018 – junio 2019)



La instruado de Esperanto estas unu el la ĉefaj kaj prioritataj statutaj celoj de REU, regula agadkampo de esperantistaj kluboj kaj de apartaj instruantoj de Esperanto.

A. Kursevidantoj

A.1. La esperantista averaĝa aĝo de la kursgvidantoj estas 39 jaroj. Kursojn organizas kaj gvidas tradicie malnovaj esperantistoj, posedantaj multjarajn instruspertojn.

A.2. Instruista kvalifiko: diplomitaj lingvoinstruistoj konsistigas 36%, trejnitaj Esperanto-instruistoj – 36%, amatoraj instruantoj de Esperanto – 28%. Sed ankaŭ amatoroj estas spertaj esperantistoj kaj kursgvidantoj kapablaj instrui Esperanton samnivele kiel profesiaj lingvoinstruistoj. Inter la kursgvidantoj de ĉi tiu jaro 60% estas membroj de REU.

B. Kursoj

Diversnivelaĵoj kursoj de Esperanto (15) kun la entuta nombro de la kursfinintoj de 79 personoj estis gvidataj en 13 urboj de Rusio.

B.1. Nivelo de kursoj

	A 1	A2	B 1 – B 2	C1
Nombro de kursfinintoj	39	20	8	12
Mezuma aĝo de kursfinintoj	20	34	34	67

La sufiĉe altan aĝon de la C-niveluloj kaŭzis la traduk-kurso, gvidita de Anatolo Masenko por emeritaj blinduloj dum la pasintsonera jamboreo. Estas videble, ke la perfektiga elano iom post iom estingiĝas ĉe la B-kaj C-nivelaj kursoj, kies neceso estas evidenta, sed kies gvidado postulas kaj tre diligentan preparadon kaj altkvalitajn instruistojn.

B.2. Unu kurso mezume daŭris 19 sesdekminutajn instruhorojn. (Se ordinare ĉiu leciono tradicie daŭras 1,5 aŭ du horojn, la averaĝa baza kurso havas 10-12 lecionojn).

B.3. Tipoj de kursoj

Movadaj kursoj	14	93%
Lernejoj kursoj	1	7%
Ĉeestaj kursoj	8	53%
Dumaranĝaj kursoj	7	47%
Pagataj kursoj	2	13%
Senpagaj kursoj	13	87%

Preskaŭ ĉiuj movadaj kursoj estis iniciatitaj kaj gviditaj de kursgvidantoj mem, ili okazis plejofte ne en fakaj lingvoinstruejoj sed ĉe eduk-klerigaj kaj ripozigaj establaĵoj: bibliotekoj, turistaj bazejoj ktp. Ordinare la movadaj kursoj estas ankaŭ senpagaj. Iom kreskis la nombro de dumaranĝaj kursoj, kiu fakto pledas por rivelado de pozitiva tendenco, ĉar organizantoj de diversaj aranĝoj enprogramas ankaŭ mallongdaŭrajn kursojn por paroligi dezirantojn kaj perfektigi iliajn lingvokononjn.

C. Programoj kaj lernolibroj

C.1. Ĉiuj okazigitaj kursoj ne uzis kiel apogilon kaj metodikan gvidilon programon de Esperanto-kurso, kaj rezulte preskaŭ senescepte ne estis planitaj kaj taksado de lingvokononj resp. de akiritaj / evoluigitaj kababloj kaj atestado de kursfinintoj.

C.2. Kursgvidantoj uzis lernolibrojn en 27% de kursoj, proprajn instrumaterialojn en 40%, sen lernolibroj okazis 33% de kursoj.

C.3. La taksado de lingvokononj kaj kapabloj ne estis realigita en duono de kursogrupoj. En la alia duono por la taksado servis monologaj sinprezentadoj, interagaj paroltaskoj, rolludoj, skribaj verkoj, traduktaskoj, kaj tre malofte okazis la taksado per gramatikaj kaj leksikaj testoj.

C.4. Lernolibroj . En kvar grupoj estis uzataj lernolibroj kaj aliaj akcesoraj instrumaterialoj: “Zagreba metodo”, Anna Löwenstein “Esperanto rektmetode”, Stano Marček “Esperanto per la rekta metodo”, Boris Kolker “Internacia lingvo. Plena lernolibro de Esperanto”, Vladimir Opletajev “Facetoj”, aŭdvidaj materialoj de la novaj agentejoj “La Balta ondo”, alispecaj enretigitaj instrumaterialoj.

E. Metodoj

E.1. El inter diversaj instruformoj kaj metodoj en la kursoj de Esperanto estas aplikataj plejparte: gramatika metodo - 33%, miksita metodo - 37%, situaci-komunika metodo – 22%, rekta metodo – 4%, traduka metodo – 2%. La preferata miksita metodo rezultas el la pli amasaj A1 – kaj A-2-nivelaj kursoj, kiuj postulas kaj gramatikan aliron kaj samtempe ankaŭ la evoluigon de parolkapabloj.

D. Kursfinintoj

D. 1. Nombro de kursfinintoj laŭ la lingvaj niveloj kaj ilia mezuma aĝo. La averaĝa kursano en la pasinta lernojaris havis la aĝon de 29 jaroj.

	A 1	A2	B 1 – B 2	C1
Nombro de kursfinintoj	39	20	8	12 = 79
Mezuma aĝo de kursfinintoj	20	34	34	67

D2. La atestado de kursfinintoj ne okazis en 10 grupoj. Nur en 3 grupoj la kursfinintoj ricevis atestilon pri la kurso , en 2 grupoj – certigilon pri la vizitado aŭ partoptreno en la kurso.

Konkludoj.

1. Ĉiuj kursgvidantoj - diplomitaj, trejnitaj aŭ amatoraj perantoj de Esperanto – meritas estimon kaj gratulojn pro la grava agado, kiun ili efektivigas senprofite malgraŭ multaj obstakloj kaj malfacilaĵoj. Ĉi-jare ni danku al instruantoj de Esperanto el pluraj urboj de Rusio kaj al gastinstruistino el Franco pro la senlaca laboro, kiu celas la popularigon kaj disvastigon de Esperanto: Darja Arbekova (Novosibirsko), Katerina Arbekova (Novosibirsko), Gennadij Basov (Tomsko), Irina Gonĉarova (Odincovo), Vjaĉeslav Ivanov (Sankt-Peterburgo), Anatolo Masenko (Kislovodsko), Françoise Noireau (Francio), Konstantin Obrazcov (Tomsko), Vladimir Opletajev (Surguto), Andrej Rjazancev (Murmansko), Vladimir Sapojnikov (Krasnojarsko).

Krome ĉiuj nombroj kaj analizataj faktoj estas prenitaj sen la konsidero de la rezultoj de la Printempa lingvotrejnado en Jekaterinburgo (6 kursgvidantoj: Andrej Grigorjevskij (Ŝumerla), Tatjana Vŝivceva (Miasso), Irina Gonĉarova (Odincovo), Olga Ŝilajeva (Glazovo), Ilja Gnasarjov (Penzo), Aleksandr Mitin (Niĵnij-Novgorodo), kiuj instruis al ĉirkaŭ trideko da kursvizitantoj) kaj la instruado de Esperanto de Anna Striganova kaj Dmitriĵ Ŝevĉenko (Moskvo) ĉe RUDN; 5 kursfinintoj).

2. La nombro de kursfinintoj kvante kaj kvalite nek superis la pasintjaran rezulton nek iĝis malpli granda. Ĝi evidente kaj konkrete atestas multajn problemojn, pro kiuj ne efikas kaj lamas la instruado de Esperanto en Rusio.

3. Esperanto-instruistoj de Rusio ne estas unuigitaj, ĉiuj individue fosas propran sulkon en propra urbo aŭ regiono. Kursgvidantoj preskaŭ ne popularigas proprajn sukcesojn kaj eltrovaĵojn nek verkas por publikigo artikolojn pri instru-metodikaj temoj kaj pri siaj didaktikaj spertoj. ne sufiĉas spertinterŝanĝoj. Eĉ la tradicio pri regulaj informado kaj raportado pri gvidataj kursoj mankas. La problemo de la asociado de rusiaj Esperanto-instruantoj restas daŭre aktuala. Diversaj vojoj ekzistas por solvi ĉi tiun problemon: fondi memstaran landan sekcion de ILEI, starigi instru-metodikan komisionon ĉe REU, organizi sendependan laborgrupon aŭ laborrondon de Esperanto-instruantoj ktp. La spertoj montras, ke la aferon bremsas manko de homoj pretaj kaj kapablaj gvidi la tutan agadon. Aliaj organizaj obstakloj dume en la nuna etapo ne ekzistas.

4. La instruado de Esperanto en Rusio estas afero de entuziasmuloj, kiuj preferas laŭ propra iniciato gvidi movadajn privatajn kursojn, plejparte A-nivelajn. Esperantistaj kluboj estas malfortaj kaj malmulte zorgas (aŭ ne povas tion efektiviĝi pro objektivaj kialoj) pri seninterrompa kontinuigo de la instruado de la baza ĝis pli altaj niveloj. Rezulte kursfinintoj ofte ne atingas la gradon de komencintoj kaj restas en la kategorio de homoj, kiuj nur informiĝis pri Esperanto. Espereble ili restas tamen amikoj de Esperanto.

5. La aĝo de agantaj kaj aktivaj kursgvidantoj fariĝas ĉiam pli kaj pli alta, kio malkovras neeviteble la problemon de generacioj ankaŭ en la instruista medio. Junaj, aktivaj, iniciatemaj, doktaj kaj plenaj de freŝaj ideoj instruantoj de Esperanto aperas tre malofte.

6. "Eminenta rusia instruisto de Esperanto" ne estas ĉi-lernojare proklamita de la Estraro, ĉar kandidatoj ne plene plenumis la kriteriojn pri la organizado kaj gvidado de kursoj.

7. Preskaŭ ne fosata estas la tereno de oficialaj aŭ fakultativaj universitataj, kolegiaj kaj lernejoj kursoj, kvankam ili ĉiuj estas eblaj, se troviĝas diplomitaj instruistoj kaj dezirantoj lerni Esperanton. Sola escepto: RUDN kaj la kursoj, organizataj de Anna Striganova kaj Dmitriĵ Ševĉenko. La instruado de Esperanto al lernejoj ne estas afero de unu kurso, ĝi postulas konstantan protektadon de infanoj postkurse t.e. daŭras kelkajn jarojn. Ne ĉiu profesia instruisto pretas al tiom longa temporaba laboro.

8. Instruistoj de Esperanto estas homoj kreemaj. Dum la lastaj tri jaroj aperis libro-aŭ bitforme novaj lerniloj de Esperanto grandparte por la niveloj A1-A2-B1, kies aŭtoroj estas Tatajana Loskutova (Ivanovo), Boris Kolker (Usono), Vladimir Opletajev (Suguto), Tehnkom; ĉefredaktoro Jevgenij Sosov (Kazano).

9. Danke al la interreto kaj retaj kursoj la esperantistan komunumon ĉiam pli ofte vivigas kaj subnutras memlernantoj de Esperanto, kiuj nombre eble povus eĉ tiurilate konkuri kontraŭ A-nivelaj kursanoj, aliĝantaj postkurse al kluboj, sed precizaj datumoj, krom apartaj pozitivaj faktoj, ne estas vaste konataj, kaj ĉi tiu interesa temo atendas sian esploranton.

Vladimir Opletajev

Noto. Mi konsideras mian estraranecon en la pasinta Estrara oficperiodo 2017 – 2019 kaj defio kaj granda sperto, kiu lertigis min esti kaj kunaganto kaj analizanto de realaj procezoj (ofte komplikaj, distordaj kaj ne ĉiam esperpromesaj) en la enlanda movado. Mi deziras, ke REU kiel eble pli rapide superu krizajn momentojn kaj ĉiam restu la organizaĵo de veraj samideanoj. Vladimir Opletajev

Rezultoj de la laboro, raportoj

Raporto de komisiito pri dokumentado

Dum la interkonferenca periodo estis kelkaj epizodoj pli-malpli gravaj, al kiuj mi kontribuis laŭpove.

1) Tuj post la 29-a Konferenco en aŭgusto 2017 al mi mesaĝis ĵus elektita estrarano de REU Irina Gonĉarova. Ŝi informis, ke dum la Konferenco ŝi estis elektita respondeculo pri la regiona agado, kaj petis helpon pri bazaj dokumentoj por komenci la agadon. Memorige mi transsendis al Irina la Regularon pri la regionaj kunordigantoj de REU, akceptitan en 2002.

2) En oktobro 2017 al mi mesaĝis estrarano de REU Vladimir Opletajev kun peto legi kaj laŭbezone korekti la kompilitajn de li protokolojn de estraraj kunvenoj. Mi faris plurajn rimarkojn, kiujn Vladimir akceptis kun danko.

3) En decembro 2017 al mi mesaĝis estrarano de REU Mikaelo Ĉertilov (tio estis 2,5 monatojn antaŭ lia neatendita forpaso, kaj la epizodo evidentiĝis la lasta en nia plurjara kunlaborado). Li sendis al mi projekton de la Regularo pri KER kaj petis ke mi legu ĝin kaj faru rimarkojn. La rimarkojn mi sendis, kaj poste Mikaelo prezentis la projekton, en kiu ankaŭ miaj rimarkoj estis konsideritaj, por voĉdono en la Estraro de REU. Rezulte la projekto estis aprobata kaj publikigita en la Bulteno de REU (№ 93).

4) En oktobro 2018 al mi mesaĝis Kirill Noviĉenko kun demandoj pri bezonataj paŝoj por restarigi la junularan sekcion de REU - REJM. Mi respondis kun indikoj pri la teksto de REJM-Statuto kaj pri la necesaj proceduroj laŭ la Ĝenerala Regularo.

5) En februaro 2019 al mi mesaĝis estrarano de REU Aleksandro Lebedev, petante fari rimarkojn pri la kompilita de li projekto de Kotizregularo. La rimarkojn mi faris, Aleksandro ilin utiligis, la Estraro akceptis, kaj la rezulto, jam sub la titolo "Regularo pri membreco kaj kotizoj en REU", aperis en la Bulteno (№ 101).

Viktoro Aroloviĉ

Lastatempa agado de la Krasnodara klubo



Dum du pasintaj jaroj en Krasnodar ne okazis iuj kursoj de Esperanto, pro jam pridiskutitaj kialoj. Tamen esperantistoj ĉiam renkontiĝas en neformala etoso por festeni plej tradiciajn rusiajn festojn, ankaŭ por gratuli naskiĝtaganojn kaj des pli jubiliantojn.

Okazis kelkaj neatenditaj surprizoj por esperantistoj flanke de lokaj amaskomunikilanoj. Ekzemple, ĝuste fine de julio en la jaro 2018, en Junularan Centron oni venis el la loka televido, intervjuis esperantistojn kaj faris programon, dediĉitan al la 131-a datreveno de Esperanto. La televidelsendo daŭris nelonge, dum kelkaj minutoj, en novaĵprogramo. Tamen... Tuj post la programo, post kelkaj tagoj, la gvidantaro de Krasnodara E-klubo (Anatolo Ivasenko kaj Gennadij Paveljev) estis invititaj en studion de Radio "Majak-Kubano". Oni muntis longan intervjuon kaj

elsendis ĝin dum unu horo, preskaŭ sen eltranĉoj kaj ŝanĝoj.

09.12.2018 krasnodaranoj festenis Zamenhof-Tagon. Tio estas tradicia celebros de nia kara Paĉjo, sed ĉiufoje oni penas organizi la momenton iel nekutime interese. Tiam ni ĉiuj preparis sian eron por interese pasigi la tempon. Iuj legis prozaĵon, iuj deklamis versaĵojn... Mi preparis arkivajn bildkartojn, adresante ilin al ĉiu ĉeestanto persone, kun nekutimaj, brilaj E-proverboj. Ni mem laŭtleĝis ilin kaj enmanigis al samideanoj. Pri tio estis verkita artikolo kaj publikigita en BdREU.

14.04.2019 - dum la tuta tago Krasnodara E-klubo akceptis Renee Triolle. Ankaŭ tio estis priskribita en BdREU.

10.05.2019 - bela, elkora festenado de la Venkotago en neformala etoso. Oni deklamis versaĵojn, kantis ruslingve kaj esperante kantojn de la Granda Patrolanda milito. Estis gratuloj al Anatolo Ivasenko okaze de lia 70-jariĝo.

Marina Kocarj, nome je krasnodaranoj

Esperantistoj dum “Balmontaj Tagoj” en Ŝujo

Meze de junio en la antikva urbeto Ŝujo, Ivanova gubernio, estis organizitaj “Balmontaj Tagoj”, dediĉitaj al la naskiĝtago de la poeto Konstanteno Balmonto. La programo estis tre riĉa kaj ege interesa. Krom multaj parencoj, poetoj, bardoj, lokanoj, gastoj la aranĝon partoprenis nia modesta delegacio: Svetlana Smetanina (ĉeforganizanto de la vojaĝo), Ludmila Novikova, kiu tradukis pli ol 40



versajojn de Balmonto kaj du niaj bardoj – Mikaelo Povorin kaj Andreo Obrezkov.

Komenciĝis la festeno per la malfermo de la ekspozio en la muzeo, kiu portas la nomon de K. Balmonto, kaj ĉi jare la muzeo havas 15-jaran jubileon.

La dua programero estis ĉarma kaj neordinara. Venis delegacio el la estona urbeto Silamjae, kie K. Balmonto ofte ripozis kaj kie estis verkitaĵoj “Feinaj fabeloj”. Oni montris filmon pri la lokoj, kie siatempe ripozis rusia elito. Estis prezentita nova eldono de la libro kun belaj fajnaj bildoj.

La ĉefa kaj tre solena parto de la tago estis inaŭguro de la unua en

Rusio monumento al Konstanteno Balmonto apud la muzeo. Pasintjare esperantistoj, partoprenintoj de RET-2018, fotiĝis ĉe la shtono kun la subskribo: “Mi vent’ libera, eterne blovas!” Nun sur ĝi majestas la figuro de la poeto. La momento estis vere historia, elpaŝis la skulptisto, la urbestro, gastoj el Moskvo, Novosibirsko, Estonio, Ivanovo, parencoj, ktp.

Post la solenaĵoj ekis poezia maratono “Planedo de Konstanteno Balmonto”, kie prezentis sin poetoj, literaturaj organizoj, bardoj. De



nia flanko iom parolis mi, gratulis, dankis pro la invito, enmanigis etan donacon (moskvan ĵurnalon kun la artikolo “Aventuroj de Balmonto en Novo-Gireevo”, kaj 2 novajn libretojn de B. Kolker). Poste elpaŝis Ludmila Novikova, ŝi deklamis la poemon “Mi – ruso” en sia traduko. Sekvis Mikaelo Povorin kun la kanto “Senparolo”, muziko lia kaj traduko de Ludmila. Kaj fine de nia programero prezentis poemon de K. Balmonto la sia muziko kaj, kompreneble, traduko de Ludmila, Andreo Obrezkov: “Mara animo”.

Ampleksa kaj kortuŝa programo post la maratono estis en la lernejo, kie lernis la poeto kaj kiu portas nun lian nomon. Koncertumis kaj ĉarmigis la gastojn lernantoj, kiuj perfekte deklamis versojn de sia ŝatata samurbano.

Per du busoj ĉiuj gastoj estis veturigataj al la vilaĝoj Jakimanna kaj Gumniŝĉi, kie ni vizitis la tombojn de la gepatroj de K. B., preĝejon, kie li estis baptita, la gigantan tilian boskon, kiu apudis la gepatran bienon, laĝeton, kiun enrigardis la fenestroj de la nun ne ekzistanta domo...

Kronis la streĉe organizitan programon la tradicia “Balmonta lignofajro” en la urba parko, surborde de la rivero Teza. Sonis kantoj, rememoroj, denove versoj de Balmonto kaj de lokaj aŭtoroj. Mikaelo Povorin plenumis du kantojn: “Senparolo” en la rusa kaj “Ora fiŝeto” en Esperanto. Antaŭ la dua kanto ruslingve deklamis la poemon “Ora fiŝeto” Daŝa Smetanina.

Kiel oni kutime skribas: lacaj, sed tre kontentaj revenis ni hejmen.

Balmonata programaro dauris tri tagojn, ni partoprenis nur la duan tagon.

Por fini ĉi rakonton mi ŝatus prezenti ĉi tie famegan kaj ofte deklamitan en tiu tago la verson de K. Balmonto “Mi – ruso”.

Sv. Smetanina

Mi – rusa, mi – rura, mi – rufa,
Naskiĝis sub sun’, ne sub lun’.
Atestas, ke l’ diro ne blufa,
La ond’ de l’ harara orlum’.

Mi – rusa, mi – rufa, mi – rura.
Mi vagis tra l’ maroj de l’ mond’.
Farante fumilon ajhuran,
Sukcenan bidaron sur bord’.

Mi – rufa, mi – rura, mi – ruso.
Min regas sagac’ kaj delir’.
Mi iras – per streta vojkurso,
Mi venos – vastsuna sor-ir’.



Traduko de L. Novikova (2017)

Katalogo de Esperanto-lerniloj, verkitaj, eldonitaj, enretigitaj en RSFSR kaj Rusia Federacio (1957 – 2019)

Unu el la decidoj de la Instruista seminario de RET-2018 (Ŝujo) estis pretigo de Katalogo de rusiaj lerniloj de Esperanto.

Al la kategorio de lerniloj apartenas lernolibroj de Esperanto unu – kaj dulingvaj, gramatikaj informiloj, instruaj legolibroj, helplerniloj, vortaretoj, man - kaj gvidlibroj por instruantoj de Esperanto inkluzive de tradiciaj paperaj eldonaĵoj kaj de enretigitaj bitkursoj kaj destinitaj por lernantoj de Esperanto kaj por tiuj, kiuj prepariĝas al diversgradaj ekzamenoj.

En la nuna etapo la Estraro de REU inkluzivigis en la Katalogon Esperanto-lernilojn, verkitajn, eldonitajn, enretigitajn en Rusia Soveta Federacia Socialisma Respubliko kaj Rusia Federacio ekde la jaro 1957. La Katalogon ne eniris dume grandaj vortaroj de Esperanto, publikigitaj en la periodo 1957 – 2019. La kataloga tabelo konsistas el sep partoj, kiuj prezentas bazajn informojn pri ĉiu enlistigita eldonaĵo. Mallonga referenca noto antaŭmetas koncizajn specifojn de ĉiu lernilo.

La kompilado de la Katalogo estis lanĉita oktobre de 2018, ĝiaj partoj estis felietone publikigitaj en “Bulteno de REU” (numeroj 99, 100, 101, 102, 103, 104). La kompilinto de la Katalogo konsultis multajn personojn, kiuj estas sincere dankataj por subteno kaj helpo:

Nikolaj Gudskov (Moskvo),

Irina Gonĉarova (Odincovo),

Svetlana Smetanina (Moskvo),

Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvino),

Aleksandr Korĵenkov (Kaliningrado),

Anatolij Masenko (Kislovodsko),

Aleksandr Osincev (Jekaterinburgo),

Jevgenij Sosov (Kazano),

Larisa Ŝapoŝnikova (Arĥangelsko),

Dmitrij Ŝevĉenko (Moskvo),

Boris Zozulja (Rostov-ĉe-Dono).

La Katalogo estas kompletigota kaj ĝisdatigota. Ĉiuj korektoj, precizigoj kaj aldonoj estas akceptataj de la Estraro de REU.

La katalogo estas elŝutebla ĉe https://vk.com/reu_vk

Vladimir Opletajev

Oni pri ni

Oni miru pri esperantigita Puŝkin!


Ĉiam mirinde agrablaj pozitivaj mencioj pri Esperanto, speciale kiam ili aperas en la artikoltitoloj de gravaj gazetoj. Do, la 15-an de junio sur la paĝo de “Literaturnaja gazeta” aperis artikolo “Aleksandr Sergejeviĉ en Esperanto”, kiu raportis pri festo okaze de 220-jariĝo de A. S. Puŝkin en la moskva ĝardeno je la nomo de Baŭman. Ene de la artikolo pri Esperanto estas nura mencio, ke “La versoj de la poeto ankaŭ sonis en nekutima por ĉiuj plenumo en la greka kaj eĉ en Esperanto”, sed la fakto, ke ĝuste tio trafis en la titolon – evidente, por kapri la atenton – agrablas, ĉar altiras tiun atenton al nia lingvo.

Vidu: <http://lgz.ru/news/aleksandr-sergeevich-na-esperanto/>

La samo okazis en la Kabardia-Balkaria universitato en Nalĉik – ĉi tie en la jubilea aranĝo Puŝkin sonis en la 15-lingvoj, inkluzive Esperanton, pri kio informis kelkaj lokaj amaskomunikiloj: <http://kbrria.ru/kultura/v-kbgu-pushkin-zvuchal-na-15-yazykah-30225>, <https://news.yandex.ru/yandsearch?lr=213&cl4url=https%3A%2F%2Fkbpravda.ru%2Fnode%2F1677&from=search> ... Ĉi-foje la vorto “Esperanto” ne trafis al la titolo, sed la fakto estis menciita.

Ankaŭ en Odeso okazis simila afero: <http://www.odessapost.com/v-odesse-sosto-jalis-tradicionnye-pushkinskie-chtenija/>

Do, ni sicere danku al Aleksandr Sergejeviĉ pro lia kontribuo al kreo de pozitiva bildo pri Esperanto ĉe ĵurnalistoj!



Karaj geamikoj!

En Uljanovsko estas grandega stoko de rus-esperantaj vortaroj de Je. Bokarev.

Ili estas liverataj senpage al vi, viaj kluboj, por kursoj, por komencantoj, bibliotekoj, ktp.

La kondiĉo estas unusola: poŝtelspezojn bv pripagi mem. Interesatoj turnu vin al Jurij Karcev: yuka@yandex.ru

Anoncoj

Bulteno de REU (BdR) estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo “RUSIA ESPERANTISTA UNIO”
BdR atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru aŭ (kaj) Svetlana Smetanina svsmetanina@yandex.ru

Estraro de Rusia Esperantista Unio